



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 113 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Novembro 1929.

ESPERANTO.

A concise History of the International Language.

(By Wm. King, D.B.E.A., Secretary N.Z.E.A., Wellington, N.Z.)

(Continued.)

The outline of the progress of 1928 is concluded with two facts; Japan placed Esperanto into an additional number of universities and schools; and several wedding ceremonies were conducted in Esperanto.

Today there are no fewer than 2,000 groups of Esperantists with a membership of about 130,000, but outside these groups, are many thousands of men and women who through various channels have learned the language; and nearly two hundred broadcasting stations in 33 countries have broadcast lessons in Esperanto. It would be impossible, therefore, to say how many have learned the language, but it is believed that not fewer than one million have acquired a knowledge of Esperanto.

According to incomplete statistics compiled by the League of Nations (vide League's Report, 1922) about four million Esperanto textbooks had up to that year been sold, and nearly one hundred thousand had followed Esperanto courses. As regards Esperanto literature, the library of the Esperantists' Central Office contains four thousand volumes, and since 1920 a new book in Esperanto on scientific or other subjects is published every day of the year; and at the present time there are poets and writers, Eastern and Western,

who are adding to the stores. The Esperanto Press includes about one hundred reviews and periodicals, one of them appearing in Braille for the use of the blind, which has a circulation of 750 copies. A glance at the Esperantists' book-list discloses many gems of literature of various nations, the Bible, works of Dickens, Shakespeare, Sir Rider Haggard, Moliere, Jerome K. Jerome, Goethe and Schiller. In addition to a host of Esperanto text-books—30 textbooks and 8 dictionaries in English—and literature relative to the language and its history, an abundance under the headings of fiction, drama, verse, religion and philosophy, sociology and politics, and commerce, science, and technics, is to be found. Pitmanic and Gregg systems of shorthand, as well as others, have been adapted to Esperanto; and a Esperantist Stenographers' Association has been formed. Esperanto gramophone records, entertaining and educational, have been manufactured, many Esperantists using them as means ensuring uniformity in pronunciation.

Numerous countries and towns have issued guide books in Esperanto, these receiving a world-wide distribution per medium of the Universal Esperanto Association; and post-offices in many towns display Esperanto notices. Other countries provide bonuses for postal, tramway, and railway officers and policemen who have learned Esperanto. The International Labor Office of the League of Nations publishes 10,000 copies of its bulletin in Esperanto. Well-known international fairs, such

as the Paris, Basle, Padua, Lisbon, Bratislau, Bordeaux, Breslau, Barcelona, Malmo, Prague, Vienna, Helsingfors, Lyons, Frankfurt and the Leipzig Fairs issue prospectuses in the language.

(continued.)

ESPERANTO AND CLASSICAL CULTURE.

From the camp of the classicists too often are heard voices opposing Esp-o—evidence of a view that calls for adjustment. Logically, the Latinist, the Hellenist, and the Sanscrit scholar, such as the late Profs. Max Muller and Meyer, and Prof. G. M. Murray, with us today, should be among the staunchest supporters of Esp-o.

While the needs of modern life make incumbent the mastery of foreign languages, there is found in practice a tendency to study several of them superficially, rather than one of them profoundly. Meanwhile, in the higher schools neglect of the classics is steadily increasing. There are many who note this with satisfaction, glad that their children are to be spared the agony of wrestling with Latin declensions or Greek conjugations. With an eye on realities they prefer that a child should know how to repeat parrot-like identical phrases in four or five different languages.

On the other hand, many regret this attitude to the ancient tongues, holding that this superficial language learning is hurtful not only to the national culture but also to the international sympathies. The study of the same ancient idioms is, they aver, one of the common bases of the civilisation of many nations. They esteem of high value the experience of those mighty people who taught us the principles of art, of law, and of philosophy. They fear that mankind stands to lose heavily if it severs itself from the venerable founts of inspiration. In education circles, in the newspapers, even in Parliament, one hears the din of battle between the classic and the modern languages.

The classicists consider the Esp-ists to be the most rabid of the moderns, and from their side the Esp-ists regard the pleaders for the dead languages as blind to the facts of life, foolish beings, some of whom even yet indulge fancies that Latin may become an instrument of international communication.

Both sides are wrong. The true Latinist knows well that history will not repeat itself here. The day of

Latin as an I.L., although useful in its day, has long since passed, and if the nations assembled authoritatively suggested that such a difficult language were to be chosen as an I.L., that is, to be used by the peoples as well as by the intellectuals, it is certain that the masses would choose a modern tongue, as being at least fitter to the time. Even today, Esp-o is more widely used, and more usable, than Latin (which, in practice, is limited to purely ecclesiastical affairs), and it was not without consideration that the International Telegraphic Union modified its regulations so as to place Esperanto within the scope of Art. vii.

If this easy I.L. were taught in all the schools of the world, the practical side of the problem would be solved, and the claims of modern life would no longer play the decisive role in the battle between the dead and the living tongues. The question would then resolve itself into a matter of choice. Everyone would be free to base his culture on a study of modern languages or on classical ones, or on a more profound study of one modern and one classical tongue, according to his intellectual preference, and not under the pressure of material necessity. Perhaps the time will come when, in greater numbers, Western students will be able to explore the treasures of Sanscrit and Arabic, and so feel a deepened consciousness of their relationship to the East.

Sure it is that in the atmosphere produced by the universal acceptance of Esp-o, the study of Latin and Greek in Europe, and Sanscrit in Asia, would receive strong impulse to flourish again. Without Esp-o, modern languages will certainly gain the day, through sheer human necessity; with Esp-o, the dead tongues have a chance.

Instead of wrangling, or shrugging the shoulders, it would be wiser for us, Esp-istoj, to politely explain the above to the classicists; and if these listen objectively they will sooner or later realise that they have grave cause to be friendly with us, in order that their cherished ideals may be preserved. It seems an audacious paradox, but it is a profound truth nevertheless, if only one gives it a little thought.

According to the Esperanto of Dr. E. Privat, in May "Esperanto."—Robo.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas ricevon de fidelulaj abonoj jene:—Amiko 20/-; per s-ro Cox 1/3; A. Slade 9/-, julio, '31; H. Love 4/6, julio, '30; Syd. Esp. Club

(anonco) 5/6, aŭg., '30; D. Guilbert 1/-; s-ino M. Dunne, 4/6, majo, '30; M. Maronovich, 5/-, aŭg., '30; s-ino Trewin, 4/6, sep., '30; fino Fairfield, 4/6, okt., '29; d-ro W. Lamb, 4/6, aŭg., '30; s-ino Payne, 5/-, okt., '30; k 2/- pro anonco; E. Cox, 4/6, julio, '30; s-ino F. Tondut, 4/6, junio, '30.

VOJAĜBILETOJ.

Altkreska, maldika viro li estis, kun delikattrajta vizaĝo kaj trankvila sinteno. Ĉe li mi tuj senĝeniĝis. Mi sentis tian malsarĝon, ke mi decidis ĉion konfesi, kaj fidi je lia kompato. Unue mi moderigis mian voĉon kaj hontmiene konfesis mian kompletan nescion pri fremdlanda vojaĝado. Li tute ne montris tiun malestimon kiun mi ne dubis, persono en lia pozicio devus senti. Eĉ pli modorigante la voĉon, mi demandis pri pasportoj, temo kiu neeviteble eligis la sciigon, ke ĉi tio estos mielmonata vojaĝo. Li montris sufiĉe ĝentilan intereson kaj kompletan mankon de scivolemo. Mi sentis profundan dankon, tiom pli ke tiu momente mi ekvidis la amuzitan alrigardon de lia juna helpisto kaj ekkomprenis, ke prefere ol fari al li tiajn konfesojn, mi tuj aĉetus biletojn al Devonshire.

La plej malbona momento do forpasis, kaj mi ekdiskutis miajn planojn kun s-ro Johnson. Mi nomis la lokojn en Italujo, kiujn mi deziris viziti, kaj tuj mi konsciigis pri ŝanĝo en lia sinteno. Lia antaŭa ĝentila intereso jam fariĝis entuziasmo. Sendube li havis vastan scion pri la lando. Li ŝajnis preta kaj dezirema tre longe preparoli ĉiun detalon de mia projektita rondvojaĝo. Por li hortabeloj enhavis neniam terurojn; en lia kapo li ŝajne portadis nevideblan fervojan gvidlibron italan; nur unufoje li petis la blondharan junulon serĉi por li horkombinon. Antaŭ ol mi eliris la oficejon, ŝajnis, ke jam en lia menso staris kompletigita bildo de la tuta rondvojaĝo.

Post tio mi havis kun li multnombrajn interparolojn, kaj ĉiam li impresis min sammaniere. Unue, kiam ni diskutis pasportojn, Ĉanel-transirvojojn, kaj Parizajn hotelojn, li montris ĝentilan intereson; sed de post la momento kiam ni, transirinte la landlimon, eniris Italujon, lia intereso fariĝis entuziasma kaj vigla. Lia entuziasmo estis infekta; ĝue mi aŭskultadis lin, ĉar dum li parolis, ŝajnis, ke la lokoj priskribitaj de li starigis antaŭ miaj okuloj.

Jen li diris, "Mi rezervigis ĉambron por vi ĉe hotelo apud la rivero Lungarno en Florenco. Estas tie pli trankvile ol en la urbo. Vi superri-

gardos la riveron kaj vi povos vidi la Ponte Vecchio de via litĉambro." Jen, "Mi opiniis, ke plaĉos al vi esti apud la Granda Kanalo en Venecio. Loĝado en la hoteloj tie estas pli multekosta, sed valoras povi rigardi la trafikon kaj vivon sur la Kanalo, kaj vi estos tute proksima al Sta. Marko kaj la Placo." Plue li diris, "Mi konsilus al vi resti en Bellagio. Estas videblaj de tie ambaŭ brakoj de la lago, kaj vi povos transiri al Menaggio kaj Cadenabbia en mal multe da minutoj." Lia voĉo ame emfazigis la multsilabajn nomojn.

Fine venis la tago de mia lasta vizito ĉe la oficejo. La lerta juna helpisto salutis min per gaja rideto, kaj sciigis al mi, ke s-ro Johnson estis forvokita por kelke da minutoj kaj petis, ke ĝume mi bonvolu plenigi kelkajn blankojn, kiujn li submetis al mi. Lia kontrolo de miaj penoj estis tiel kuraĝiga, ke mi sentis deziron ekkonversacii kun li. "Mi supozas, ke s-ro Johnson laboras ĉi tie de post longa tempo?" mi komencis diri. "Pli ol tridek jaroj," li respondis indifere.

"Li havas mirindan scion pri Italujo," mi daŭrigis. "Nu, kompreneble, tio estas lia speciala fako," li klarigis. "Sed fakte, li amegas la landon. Li legas ĉiun libron pri Italujo, kiun li povas havigi al si. La subuloj ĉi tie nomas lin 'Maljuna Italujo.' Li eĉ prenadis lecionojn de itala lingvo por ke li ĝustamaniere elparoli la nomojn."

"Li do ne estis ĉe unu el viaj italaj oficejoj," mi diris. "Ne," li respondis. "Mi pensas, ke li esperis, ke tio okazu, kiam li unue venis ĉi tie, sed oni neniam translokigis lin."

"Mi pensis, ke li iam loĝis en la lando," mi diris. "Sed mi supozas, ke li havis multajn okazojn por ĝin viziti."

La junulo rigardis min momente kaj diris tutkvieste: "S-ro Johnson neniam estis ekster Anglujo, sinjoro."

Dum momento mi preskaŭ ne povis kredi lin. "Sed kiel li povus scii pri tiom da detaletoj...?" Li interrompis min dirante: "Ho, tio estas sufiĉe facila. Kiam li aranĝas rondvojaĝon por iu, li petas tiun, ke li vizitu lin poste kaj priskribu al li ĉion."

La afero ankoraŭ ŝajnis al mi nekredibla. "Sed kial li ne iris? Ĉu li ne volis iri?"

"Ho, li ja volis iri. Estis pro tio, ke li aliĝis al la firmo. Sed li edziĝis frue, kaj mi supozas, ke pro tio li devas monŝpari. Li estis irona al la italaj lagoj por sia mielmonato, sed lia edzino malsaniĝis en Londono la unuan tagon."

"Sed ĉu post tio ne estis eble—?"

mi demandis. Li levis la ŝultrojn. "Malfortika edzino kaj kvar infanoj! Nenia ŝanco por vojaĝi post tiam."

Antaŭ ol mi povis respondi s-ro Johnson mem alvenis. Niaj aferoj baldaŭ finiĝis. Li kontrolis kun mi la vojaĝbiletojn, kaj transdonante ilin al mi, li deziris al mi bonan vojaĝon per sia kvieta, gaja voĉo. Mi dankis lin pro lia afableco. "Estas nenio," li diris, sed aldonis kvazaŭ senpripense, kiam mi turniĝis por foriri, "Kiam vi jam revenos, vi eble vizitu min, por sciigi, ĉu ĉio iris bone."

El "The Manchester Guardian," trad. por "La S.K." de Wilfred Ingle, Varese, Italujo.

RECENZO.

La Dormanto Vekiĝas.

Eldonaĵo de The Esp. Publishing Co. Prezo, tolbindita 5 ŝil.; brosurita 3/6p., per AEA.

Jen frua elmetaĵo de la genio de H. G. Wells. La Esp-a traduko multloke konservas la anglan parolturnecon, sed necesas kromdiri, ke la "perpleksiĝo" de la originalo ankaŭ troviĝas reflekte antaŭ la leganto Esp-a. Tie k tie konstatata estas troa sinligo de la traduko al la anglaĵo, ĝenanta iagrade al neanglalingvanoj, kiuj tre povos cerbumi super aludoj aŭ esprimpropraĵoj de la aŭtoro. Tradukontoj tenu regulon havigi al si kontrolhelpon de spertuloj kun gepatra lingvo sufiĉe malparenca. Tio, kvankam ne en ĉiu kazo nepre necesa, donus ĝenerale pli da certeco, ke la stilo fluu sen la pezo de propralingva trafiltrajo.

Kelkaj radikoj estas uzataj en aliaj sencoj ol la donitaj de OKL. Inter ili: spion', agac', period', kontrol', diven', kontur', prov', observ', neologismoj tro ofte aperas. Jen "tranco" (alisignifa en F.I.H.P.), darfi, konekti (kunigi, kunligi), bobelo ((sap) veziko), bran-kardo (portlito, homportilo), kontesti (uzata laŭ F. conterter?), obskur', ingenia (genia) estas nenecesaj.

Neklaraj linioj: 61. Vicoj da fantomaj blankaj konturoj, kvazaŭ la fantomoj de kovritaj fenestroj . . . ; "ŝveliganta perpleksiĝo" 17/30; neĝotuŝita lumo" 60/20; "ombrotremigita" 53/15; "histeriajn ombrojn" 94/7; "senkoloran intencon" 94/24; nova vorto, kia "merĝado" 160/10 nepre ricevu por si klarigan piednoton; sensenca faro enmeti "paŭperejo" 145/14, Kaj "banderlog" sen ia klarignoto; precize kion signifas "subtil" 17/36 laŭ la tradukinto?

Kelkaj pres- kaj gramatikaj eraroj makulas la cetera bele aperigitan libron.

"Kirli" estas trans., do ĉe 56, 57, 59 "kirl'" devas esti "kirlig'"; "flave vestitoj" (—aj); 5/4 sia (lia); "subite" taŭge povus anstataŭi la monotone uzatan "abrupte" en multaj lokoj; uziĝas tri formoj kun "spite" (—al, —kun akuz., —kun nom.). La aŭtoro ĉe tio pli ĝuste uzus "malgraŭ," kiu cetero forestas rimarkinde la tekston. Se "veras," kial ne "belas," "bonas" ktp.? "Subenflugo," "suprena"; ĉu iu internacia stilmaestro adjektivigas adverbojn direktajn? "Teosofio" (z); "Goodwin" 168 (Godwin); 30/10 "krom pro" estas nebona. Kp. "se ne estus," Bat. de l'Vivo 74/12. "maloftaj neĝeroj" 59/20 (maldensaj); "iadirekte" 79/34 (senceldirekte); "ĉie ajn" 172/30 (ĉie aliloke); "dumtempa" 36/35 (pasanta, malmultedaŭra). Kelkloke devas esti adjektiva participo anstataŭ la neĝusta adverba. "Nigra festono, pendante" (a); "koridoro kondukante" (a).

La tradukinto akceptu konsilon submeti sian verkon al fremdlingvaj redaktoroj por sincera kritiko, kaj li reviziu ĝin por estonta eldono laŭ sia konstatita sintezo de la ricevitaĵi plibonig-sugestioj. Aŭ, plibone, li kontroligu ĝin rekte ĉe la E.L.A.

—Robo.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-Zelando:—Je la 23a de okt. la societo enoficigis s-ron k f-inon Wheeler kiel honorajn sekretariojn k kasistinojn. Kordankas ni al la eksiginto de la duobla ofico, s-ino Watkin, kiu longtempon elportis sindone siajn taskojn rilate E-ton en Auckland.

Paroladoj semajne de radiejo 1YA. Ĝis fino de sep/o pastro Wolloxall "pri-esperantis" kvarfoje, s-ro Wheeler dufoje, k nia prez-o, s-ro Russell unu fojon. S-ro Wheeler ankaŭ kantis E-te. La radiejestro favoras la lingvon; jam montriĝis li amiko. Ĉiujaŭde la "Star" enhavas serion da lecionoj.

CHRISTCHURCH, N.Z.—Nune tri fakoj ĉe niaj kunvenoj, nigratabula, gramatika, k koresponda. Anoj unuafakaj studas bildojn k skizojn, parole k skribe, en la dua ili pritraktas gramatikon, k triafake ili korespondas internacie. La lan de okt. anoj vesperon pasigis ĉedome de s-ro Bell, kie ili praktikis karlingve. Gratulon al s-ro Bell, jam la kvina delegito de UEA en N.Z. Li oficas por Christchurch.

WELLINGTON, N.Z.—La ĉefurba klubo aranĝis kable reprezentadon ĉe la Esperanto-Kongreso en Perth. Same faris la NZEA. Ambaŭ ekspedis al la kongreso sukcesesprimojn. Lastatempe-vizitantoj estis s-ro S. Ujdur

TO ALL OUR WELL-WISHERS!

We feel it timely to ask those who receive the "Suda Kruc" from month to month to kindly consider their position as subscribers, and, if unfinancial in this respect, to observe the moral obligation of renewing their subscription. The task of ensuring the regular appearing of our gazette is rendered unnecessarily difficult by the inattention to this important duty, the fulfillment of which—an annual visit to the nearest Post Office for a 4/6 (or 5/- N.Z. money order) postal note—should surely represent but small sacrifice to him who really believes in the need for Esperanto and its fitness to meet that need.

If in doubt, send this small sum to "Suda Kruc," Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb. It will be thankfully and correctly acknowledged in current issue.

REDAKCIO.

(Auckland), s-ro V. Sowry (Mangamaire), kiu lernis E-ton per radio, k d-ro J. Vilmits, el Sidnejo. La doktoro estas latvia ĵurnalisto, mondvojaĝanta.

En Junio la jarkunveno de la Melburna Esperanto-Societo okazis kaj, dum lia foresto, oni unuanime elektis kiel prezidanton s-ron P. Hudson. Je lia reveno s-ro Hudson akceptis la oficon kaj la oficistaro nun estas: prez-o, s-ro P. Hudson; vic-prez-oj, f-ino L. Irwin kaj s-ro P. Holmes; sek-iino, f-ino V. Cox; kasisto, s-ro E. Cox; bibliotekisto, s-ro Bishop.

Je la naŭa de Okt., s-ro Pyke bone parolis de 3LO.

Je dimanĉo, la 13a de la monato, la E-tistoj faris ekskurson ĝis "Luffman's Hill" ĉe Ringwood, kie oni kolektis sovaĝflorojn kaj admiris la belan panoramon videblan de la monteto.

La Melb. Esperanto-Klubo aranĝis vesperon je 16a de Okt., por festi la revenon de ges-roj Rawson post libertempo en la kamparo. Oni vidis multe da bone konataj vizaĝoj inter la ĉeestantoj.

Je la 16a de Okt., s-ro Skurrie donis lekcion pri Esperanto, antaŭ proks. 100 anoj de l' Societo de Katolikaj Junuloj, ĉe Hawthorn. Ili montris entuziasmon, kaj la starigo de Esp. grupo efektiviĝos preskaŭ tuj.

En la lasta monata s-ro Skurrie veturis ĝis Bendigo, kie oni aranĝis ke li donu paroladon pri Esperanto. Starigo de grupo sub gvido de s-ro Wookey, sekvis. Ĉian sukceson al la nova grupo!

NEKROLOGO.

With regret we announce the death of Miss Jean Chisholm, who was a member of the Melbourne Esperanto Society for some years prior to her last long illness, and the sincere sympathy of members is extended to her aunt, Miss E. Chisholm.

IMPORTANT!

The January number of "Suda Kruc" will be published on 28th December (Sat.) owing to the holidays.

Kindly send current "Kroniko" as early as possible.

KLASIKA LEGOLIBRO.

Broŝuro eldonita de Em. Robert, 6 Rue Ravignan, Parizo 18; prezo afrankite F. fr. 1.50. Kolekto de plej diversaj legaĵoj. Pro la lingva korekteco tiu libreto estas rekomendinda por ĉiuj Esperantokursoj.

POINTS IN THE ADVANCE.

We have learned since last issue—

That the French Chamber of Commerce now publishes an Esperanto section in its Bulletin Mensuel.

That the Daily Herald (London) now has elementary and advanced courses of Esp. for its readers.

That the International Esperanto Museum has been opened by the Austrian President in the National Library as a State Institution with grant from the Government.

DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

SANA—SANA—SANIGA.

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kjm) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

That Esp. is now taught compulsorily to 200 boys at Ellesmere Port, Cheshire, Eng.

That H.M.V. has recorded "En la Drinko," sung by a leading singer of the Budapest Opera House at the Congress of Esp.

That a history of the international language movement written by the Esperantist, E. Drezen, has been published with Government support in Russia.

That Esp. is taught in many schools in Poland, eighteen in the district of Bialystok alone.

That the first Esperanto talkie has been made, by Paramount-Famous Players-Lasky. A three-minute "shoot" of the president of the North American Esp. Congress, Henry Hetzel, and Mrs. Charles Chomette, in a dialogue.

That in the Swedish Workers' Educ. Assoc. there are 235 circles for Esperanto study, and only 148 for English. Two years ago the reverse was the case.

societies in Western Australia, which were able to extend a welcome to foreigners, who would otherwise, through language difficulties, feel stranded.

Mr. Mansfield said that the International Esperanto Congress just held in Budapest was attended by 1,200 delegates from over 30 countries. The Austrian Government had given a big grant for the establishment in Vienna of an international Esperanto museum. Professor Murdoch had recently told him that the language would be placed on the syllabus for the 1931 examinations. In other countries the same interest was shown in the movement. The aim was to teach children both their native tongue and Esperanto.

The Lord Mayor had consented to become a member of the honorary committee of the International Esperanto Museum.

Mr. Caine also responded to the welcome.

(According to the "West Australian" report).

ESPERANTO.

Congress in Perth.

Delegates to the Esperanto Congress were tendered a civic reception in the City Council Chambers on 8th October. The representatives included Mrs. Sainsbury (Q.), Misses N. Gibson (S.A.) and M. Jeffrey (Wellington), Messrs. C. Caine (Universal Esperanto Assoc.), T. Burt (British, Assoc.), Walker (Sydney), H. Byatt (Melb.), Cadden (Auckland), Steitz (Germany), L. C. Mansfield (Austria), Repley (Czechoslovakia), Davis (Yugo-Slavia) and Saar (Estonia).

The Lord Mayor (Mr. J. T. Franklin) welcomed the guests, and his remarks were supplemented by Cr. Berryman, who said that his travels in many parts of the world had convinced him of the need for a common language. Many misunderstandings could be overcome in that way. For instance, the slang Australian word "grafter" was applied to a hard worker. In America the same term was used for a dishonest person. The use of an interlanguage would leave no room for mistaken meanings.

Mr. T. Burt said they have sought to induce representatives to attend from all parts of the world that they might have first-hand information of the State's progress, but the distance had made a good representation impossible. There were several Esperanto

KURSO PER TRADUKADO.
(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sek-iino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10.)
TRADUKO 3.

GIPPSLANDA MISTERO.

(daŭrigata.)

Laŭdire de "The Port Phillip Patriot" de la dudeka de Oktobro mil okcent kvardek ses la registaro intencis sendi ankaŭ ĉevalrajdan ekspedicion. Ĉiukaze la plej zorga penado de la serĉaj ekspedicioj estis vana. Ili ne trovis (1) blankulan virinon, kaj la poezia anonco en du lingvoj ne sukcesis venigi la supozatan (3) kaptitinon (2) al la homoj celantaj (3) ŝin savi. Se ja ekzistis kaptita (3) virino, ŝia sorto devas ĉiam resti nesolvebla mistero. Eble pri la afero estis miksaĵo de fikтивaj indiĝenaj historietoj, ĉar en tiu tempo la blankulaj kolonietanoj ankoraŭ ne kutimiĝis al tiu karakteraĵo de la landidoj. Poste oni sciigis, ke blanka figuraĵo de virino, prenita (3) el rompiginta (3) ŝipo, estis vidita en la posedo de indiĝenoj, por kiuj ĝi eble havis embleman signifon. En tiu tempo ŝipoj ofte portis sub la busprito (4) skulptitan (3) figuraĵon de Brittanio. kaj por la nigruloj tio estus mirindega objekto. Pli poste nigrulo donis similan raporton al esplorantaro serĉanta (3) oleofonton en Norda Teritorio, kaj tio kaŭzis serĉon en Arnheim Land

por blankula virino supozeble surbordiginta (3) el la vaporŝipo Douglas Mawson (elp: doglas moson) (5). Oni traserĉis la regionon, faris specialan policejon, kaj sensacifaraj gazetoj publikigis tre ekscitajn kaj imagplenajn rakontojn pri la sorto de la supozata (3) virino, sed la raporto pruviĝis tiel nekredinda kiel mito kaj sen forta bazo, kaj neniam troviĝis (1) signo de tia blankula virino.—(La fino).

INSULA GARDENO EDENA.

Sur la orienta marbordo de Nova Gvineo ĉe la kvin-kaj-duona grado de suda latitudo kaj la cent-kvardek-sesa grado de okcidenta longitudo sidas la malgranda kolonieto Madang en ideala loko rilate al klimato kaj ĉe la piedo de rokplena montarĉeno, kiu abrupte sin levas malantaŭ ĝi kaj havas kovraĵon el netrairebla arbeto. Dum la vaporŝipo veturas preter la insulo Kar Kar kaj proksimiĝas al la ĉefa insulo, agrable trafas la okulojn de vojaĝanto prospektivo el malhela tropika verdaĵo, en kiu tie ĉi okazas pecoj de bril-kolora indiĝena floraro. Ĉiuflanke sur la deklivo ĝis la marbordo estas aroj de la ĉeaj facile balanciĝantaj (3) palmoj. La ŝipo eniras la havenon tra tordecan pasejon inter duone submaraj rifoj, sur kiuj malforta ondmoviĝado intermite rompiĝas en blankan akvon. Baldaŭ vidiĝas la ruĝe tegmentitaj (3) domoj de la kolonieto, starantaj (3) sub kokosujoj laŭ la tuta longo de la marfronto. Forte tenas la okulojn la sceno el multenombraj malgrandaj sed trege pentrindaj atoloj kaj ilia fono la alta montaro, de kiu fluas sennombraj riveretoj por fordoni sian akvon en la havenon, la bluan klaregan maron. Ĉio tio sub tropika suno, kies radioj prezentas en ĉiam ŝanĝiĝantaj koloroj la mirindajn belaĵojn, faras neperdeblan impreson sur la menson.—(daŭrigota).

NOTARO 3.

Preseraroj.—Notaro 1, noto 1 "plibonigu" (plibonigi); noto 4 "emociigi" (emociigi): (1) "was encountered." Notaro 1/4.—2. Substantiva participo, Notaro 1/9.—3. Adjektiva participo, Notaro 1/6.—4. "busprito" (Scienca Vortaro de Verax).—5. Ne transliteru nomojn de modernaj personoj.—6. Iuj

kursanoj tro penas imiti la frazkonstruon de la Angla originalo, kaj, tion farante, faras al si tute eviteblajn malfacilaĵojn. Oni relegu "Konsiletoj al Tradukantoj."

N.Z. ESPERANTO DEPUTATION. Minister's Reply.

The N.Z. Minister of Education, Mr. H. Atmore, forwarded on September 27th to the hon. secretary of the N.Z.E.A. his reply to the deputation which waited on him on July 12th last to urge the introduction of Esperanto into the curricula of the Primary, Secondary and Technical Schools and the University Colleges of the Dominion.

The Minister stated that while fully appreciating the very laudable objective the Association has in view, he much regretted that he was unable to grant the Association's request "in view of the fact that the subjects of instruction are at present so numerous and varied and the syllabus so full of important work."

Despite this negative reply, the N.Z.E.A. regards its effort with satisfaction, for the deputation performed the important service not only of directing official attention towards Esperanto, but also, by means of Dominion-wide Press reports, of notifying the public that the movement with all its ramifications is now firmly established and in full operation.

ELLERNADO.

(Pri la malemo de multaj Esperantistoj al aĉeto de Esperanta literaturo).

Efektive la Esperanta popolo ne estas tiel multenombra, kiel montras kelkaj statistikoj. Ni legas pri miloj kaj miloj da . . . aĉetintoj de gramatikoj . . . , da aliĝintoj al rondoj, en kiuj oni sin diletante okupas kelkafoje pri Esperanto! Sed tiu amorfa maso ne estas homogena popolo, kiu efektive praktikas la lingvon. Por tiu maso Esperanto restas akcesoraĵo. Ĝi ne kapablas sukcesigi eldonfirmon Esperantlingvan, ĉar ĝi ne havigas sufiĉan nombron de abonantoj. En Esperantujo estas tro da esploristoj, kaj ne sufiĉe da civitanoj. Multaj tute ne interesiĝas pri litera-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

turaĵo aŭ gazeto, pro tio, ke ili ne ellernis la lingvon. La plimulto el niaj nuntempaj "Esperantistoj" nur duonkomprenas Esperantan tekston. Ili estas kaj restas en la sama lingva stato, kiel knaboj, kiuj scipovas silabi nur facilan frazon: La patro estas bona. Ĉu infano, kiu nur povas silabi lernejaĵajn frazojn, aĉetas literaturaĵon aŭ gazeton? Tute ne!

Ni estru Esperanton tiel, kiel ni estras la nacian lingvon. Nur tiam nia Esperanta literaturo povos plene flori. —(Mallongigite: el "Espero Katolika").

PRI VIRINA PSIĤO.

La kredaĵo el mezepoko, nome, ke la pliparto de la virinoj estas diabloj, estas nur infanmensa. Moderna Sta. Antono ricevas mokridon kune kun konsilo, preni al si edzinon, por ke li konduku, kiel prudenta homo. La virinoj estas nek pli bonaj nek pli malbonaj ol la viroj. Troviĝas en ambaŭ seksoj ja fort- kaj malfortkarakteraj, nepasiigaj kaj emaj al pasiondoj, bonmoraj kaj malĉastaj ktp. La diferencoj inter la du seksoj nur estas tiuj, kiuj helpas al la daŭra ekzistado de la homa speco. Kontraste kun la viroj, la virinoj estas pli emociemaj, kaj iliaj emocioj moviĝas pli supraĵe de ilia naturo; iliaj korsentoj estas pli facile tuŝitaj je vido al la sufero. Ili estas pli amemaj kaj restas pli konstante en siaj amoj. Ĉiuj tiuj nomitaj kvalitoj bone efikas sur la vivi-eltenado de iliaj infanoj. La virinoj estas tute tiel honestaj kaj veremaj, kiel la viroj, krom tiam, kiam ili devigaŝ ruzi pro sia malsupera korpoforto. Ĉe ĉiuj seksrilatecoj ilia intuicio estas pli vigla ol la vira. La amo kaj pasio estas en ili almenaŭ tiel fortaj, kiel en la viroj, sed tiuj sentoj ne tiel facile flamiĝas, kaj jam florantaj ili daŭras ne tre longe kaj nur kun intertempoj de senardo. Moderaĵ fiereco je korpaspekto kaj emo sinornami estas tute laŭnaturaj ĉe la virino, ĉar tio faras ilin pli allogaj, kaj tial havigas al ili pli vastan elektokompon rilate al estonta edzo. Ke virino serĉadu laŭplane sian tutvivan kunvivanton estas same dece kaj rajte, kiel estas, ke la viro amindumu, volante edzinon.

Tiuj patrinoj, helpantaj siajn filinojn en tiu rilato, faras la plej altan patrinan devon. Malestimeginda patrino estas tiu, kiu, malfidela al sia sankta devo, nur pro la bonhavo de iu riĉulo vendas la filinon en efektivan prostituecon, vualitan de la nomo de edzineco, al

viro, pri kiu neeble estas, ke la filino lin amu.—J. I. PARSONS, "Evoluado klarigita." Trad. Robo.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikajojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.